

Eŭropa Bulteno

Aprilo 2013, Numero 126

LA LASTA ARTIKOLO PRI MOVADOJ EN LANDOJ DE EU



La lasta lando en EU pri kiu la Eŭropa Bulteno ankoraŭ ne sukcesis aperigi artikolon dum la 28 monatoj ekde la unua artikolo estas la movado en Portugalio. Post multaj klopodoj trovi homon kapablan skribi tian artikolon, mi sukcesis trovi du, kiuj malakceptis fari tion kaj fine sinjoro Antonio Martins Tuvalkin akceptis. La 26-an de aprilo li sendis e-mesaĝon ke la artikolo estas preta kaj reviziata kaj ke estos samtage sendita al mi. Poste mi atendis pliajn 6 tagojn esperante fine en la aprila numero fini la serion kaj havi ĉiujn artikolojn kiuj konsistigos la libron pri la stato de Esperanto-movado en Eŭropuniaj landoj komence de la

dua jardeko de la 21-a jarcento. Tamen la aŭtoro ekde tiu lasta mesaĝo ne plu reagis al miaj leteroj. Mi ne konas la kaŭzon, sed mi ege bedaŭras, ke en tiu ĉi numero la artikolo ne aperas. Pro tio la aprila numero iom malfruas. Se en Portugalio ne estas homo kapabla kaj preta fari tian artikolon, ni bedaŭrinde devos aperigi la libron sen Portugala movado, kio sendube estos humiliga por tiu ĉi lando.

Zlatko Tišljarić

KUNVENO DE LA ASEMBLEO DE EEU EN REJKJAVIKO



Ĉar ĉi-jare EEU ne havas la propran kongreson, la estraro de EEU post konsultiĝoj decidis okazigi la jaran kunvenon de la Asembleo de EEU en Rejkjaviko dum la Universala Kongreso. La precizan daton kaj horon ni aperigos baldaŭ post interkonsento kun UEA.

Ni petas la assembleanojn kiuj ne iros al Rejkjaviko esplori kiu el ilia lando iros al UK kaj interkonsente kun la landa estraro doni rajtigon al alia persono reprezenti lin/ŝin ĉe la kunsido. Laŭ la statuto la asembleo plenvalide funkcias, se ĉeestas pli ol 50% de la assembleanoj aŭ iliaj anstataŭaj rajtigitoj.

La materialojn (laborraporton, financajn raportojn)

ni dissendos rekte al la assembleanoj minimume unu monaton antaŭ la kunsido.

La prezidanto Seán Ó Riain

LA PROJEKTO „KIA ESTUS EŬROPO NUN SEN EU?“ FINIĜIS




Kiel ni raportis kelkfoje, EU financis projekton „Kia estus Eŭropo nun sen EU?“ kiun prezentis kaj kiel ĉefa organizanto transprenis Eŭropa Espertanto-Unio. La centro de la projekto estis tiutema konferenco okazinta en Triesto pasintjare. La projekto daŭris inter la 1-a de septembro 2011 kaj 28-a de februaro 2013. Ĝi enhavis preparojn por la konferenco, valorigajn

konferencetojn en partneraj landoj (Slovakio, Slovenio kaj Kroatio) kaj aperigon de la konferenca libro kaj reta paĝaro. Ĉion tion EEU plenumis. Okazis la valorigaj konferencetoj en Modra (Slovakio), Maribor (Slovenio) kaj Zagreb (Kroatio), ni aperigis la retan paĝaron kaj 235-paĝan libron en kiu enestas ĉiuj prezentitaj referaĵoj kaj konferencaj konkludoj. Ĉiu teksto aperis en minimume du lingvoj inter kiuj Esperanto estas unu. La artikoloj aperis plie aŭ en la angla, itala, slovena aŭ kroata lingvoj. La tre interesan libron eblas mendi ĉe EEU kontraŭ 9 eŭroj (por 3 aŭ pli da ekzempleroj kun 33%-rabato).

EEU havis pliajn du monatojn (ĝis la fino de aprilo) fari ampleksan raporton pri la projekto, kion ni sukcese faris kaj forsendis al la koncerna buroo de EU. Nun EU kontrolas la raporton kaj se ĉio estos kontentiga, ili pagos la duan duonon de la sumo kontraktita.

Maja Tišljár

ARTE TELEVIDO ENKETAS INTERALIE ANKAŬ PRI ESPERANTO

 Ĉu vi ŝatos, ke la franc-germana televidprogramo "Arte" raportos pri Esperanto? Se jes, iru al la paĝo "Die internationale Sprache Esperanto heute": <http://arte.uservoice.com/forums/203027-arte-future-de-/suggestions/3913331-die-internationale-sprache-esperanto-heute> por voĉdoni por tio - eblas doni eĉ tri voĉojn por Esperanto. Vi povas lasi ankaŭ komenton pri la temo, se vi deziras. Intertempe (mi informis ankaŭ ĉe Facebook) Esperanto kolektis jam 1000 voĉojn kaj okupas unuan lokon inter la diversaj temproponoj en la germana.

Eblas voĉdoni ankaŭ en la franclingva paĝaro de "Arte", por du proponoj rilate al Esperanto. Unu atentigas kaj memorigas pri la raporto Grin "L'histoire secrete du Rapport Grin": <https://arte.uservoice.com/forums/203023-arte-future-fr-/suggestions/3902226-l-histoire-secrete-du-rapport-grin>

La alia estas ĝenerala pri Esperanto "L'espéranto, un espoir pour l'Europe... ": <https://arte.uservoice.com/forums/203023-arte-future-fr-/suggestions/3901598-l-esp%C3%A9ranto-un-espoir-pour-l-europe->

Tiuj du proponoj kolektis jam 800 resp. 700 voĉojn kaj okupas tie la 5-an kaj 7-an pozicion.

Kiuj ankoraŭ ne voĉdonis, faru tion. Arte estas tre respektplena eŭropa televido kaj objektiva raportaĵo en ĝi povus signifi gravan informan atingon por Esperanto.

Lu Wunsch-Rolshoven

KONGRESO DE ILEI EN HERZBERG/HARZ

La 46a ILEI-konferenco (Internacia Ligo de Instruistoj Esperantistoj) okazos inter la 12-a kaj 18-a de julio 2013 en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo.

1. ALĜIS jam 70 personoj el 25 landoj! JUNULOJ ricevos grandan rabaton!



2. PROGRAMO en provizora formo por la tuta semajno, fakaj programeroj, metodika trejnado de Katalin Kovats (edukado.net), KER-ekzameneblo, ekskursoj, bankedo, folkloraj kaj aliaj kulturaj eventoj.

<http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de/page.php?pid=27774578>

IO POR ĈIUJ GENERACIOJ - laŭ la ĉeftemo: „Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj“

Zsafia Korody, vicprezidanto de ILEI

DU ANOJ DE EDE DISTINGITAJ EN POLLANDO

La 25-an de marto 2013 en la Vojevodio en Poznano la Vojevodo de Grandpolio S-ro Piotr Florek ordenis du anojn de la Estraro de la Federacio Eŭropo - Demokratio – Esperanto, t.e. la vicprezidanton d-ron Eugenon Macko kaj la sekretarion Stanislaon Rynduch per tre altaj polaj ŝtataj ordenoj – la Kavaliraj Krucoj de la Ordeno de Merito por Respubliko Pollando. La ordenojn dekrete la 6-an de decembro 2012 atribuis prezidento de Pollando Bronisław Komorowski.



La ceremonio estis tre solena, la vojevodo Piotr Florek salutis ĉiujn en Esperanto kaj en sia parolado li pruvis grandan scion pri la internacia lingvo kaj Zamenhofo. En la aranĝo ĉeestis ankaŭ la lokaj amaskomunikiloj, i.a. la Radio Mercury kaj pluraj amikoj-esperantistoj ne nur el Pollando sed ankaŭ el Hungario kaj Germanio. Post la enmanigo de la ordenoj la Vojevodo invitis ĉiujn al la regalo en la dekor-salonego kie pasis unu kaj duona horo en tre simpatia etoso kaj esperdonaj interparoloj.

Tiu estis jam plia orden-ceremonio okaze de la 125-jaroj de Esperanto estis laŭ iniciato de Pola Asocio Eŭropo - Demokratio - Esperanto kies celo estis atribuo de la ordenoj al meritaj

esperantistoj kaj tio pruvas evidente ke la polaj ŝtataj aŭtoritatoj alte aprezas Esperanton. Poste la dekoritaj esperantistoj Macko kaj Rynduch invitis ĉiujn ĉeestantojn al komuna vespermanĝo en la proksima restoracio "Sfinx".

(pliaj informoj kun fotogalerio: www.ede.esperanto.info.pl)

Eduardo Kozyra kaj Kazimiro Krzyżak

IBERIA RENKONTIĜO OKAZIS EN MADRIDO

La 9a Iberia Renkontiĝo pri Esperanto (IRo) okazis en la junulargastejo San Fermín en Madrido, la 15–17an de marto. IRo estas juneca aranĝo (sed por ĉiuj aĝoj) en la Iberia Duoninsulo, sekve organizata de unu el la asocioj: PEJ (Portugala Esperanto-Junularo), KEJ (Kataluna Esperanto-Junularo) kaj HEJS (Hispana Esperanta Junular-Societo). Ĉi-jare estis la vico de HEJS.



Vendrede vespere la interkona vespero komenciĝis per la prelego de José Antonio del Barrio (Toño), kiu klarigis al la spektantaro pri Esperanto kaj respondis al la demandoj de la interesatoj. Poste en ĝardena dometo okazis vespermanĝo, dum kiu „ĉiuj enkondukis sin mem kaj parolis kiel oni eklernis Esperanton aŭ kial oni ŝatas uzi ĝin. La etoso estis aparte amuza kaj neformala.

Sabate venis la partoprenantoj, kiuj emis lerni la lingvon en la kurso de Ferriol Macip (Farri), kiu montris la kunlaboradon de KEJ je la organizado de la evento. En la akceptejo de la junular-gastejo, apud la ekspozicio starigita de Hispana Esperanto-Federacio, Pedro Sanz starigis la libroservon kiu estis vizitita ne nur de la partoprenantoj de IRo sed ankaŭ de ĉiuj vizitantoj de la junulargastejo okaze de la popola inteŝanĝa merkato okazinta tie samtempe. Ankaŭ oni povis ĝui la atelieron pri manfarado de sapo kaj naturaj kosmetikaĵoj instruita de Mati Montero.

La tuta tago estis plenigita per prelegoj kiel tiu pri Candidaturas de Unidad Popular (Popolaj Unuigitaj Kandidatumoj, aparta maniero organizi politikan partion); pri la projekto San Fermín (la socia asembleo reganta la junulargastejon, kie okazis la renkontiĝo, kaj aliajn projektojn), peĉakuĉo (japandevena prelegstilo per rapidaj kaj mallongaj klarigoj) kie oni klarigis pri la vivo de la inventisto Leonardo Torres Quevedo kaj ties rilato al Esperanto.

La estraro de HEJS

VALENCIA ESPERANTO-RENKONTIĜO

Aperas la provizora programo de la Valencia Esperanto-Renkontiĝo kiu okazos inter la 21-a kaj 23-a de junio en Oliva (La Safor, Valencia Komunumo, mapo:

<http://goo.gl/maps/jYDbp>).

Vidu: <http://esperantoval.com/eventoj/ver2013/eo/renkontiĝo/programo>

Por aliĝilo ktp klaku sur la supra ruĝa ligilo RENKONTIĜO.

Ĝin anoncis Enric Baltasar ĉe la Facebook-paĝo de la Renkontiĝo:

Olivo en Vikipedio:


http://eo.wikipedia.org/wiki/Olivo_%28Valencio%29

http://ca.wikipedia.org/wiki/Oliva_%28Safor%29

http://es.wikipedia.org/wiki/Oliva_%28Valencia%29

Darío Rodríguez

NOVAĴOJ EL GREKUJO



1. En Januaro kaj Marto mi publikigis artikolon (1887-2012, 125 jaroj de Esperanto), en du gazetoj. La unua estis “Etnotrapeziki” (faka gazeto por la bankoficistoj kaj la dua en “Ntelalis” (regiona gazeto de Atiko).

2. La 27an de Februaro, Manta Ĥristu publike prezentis, en la ĉeesto de preskaŭ 80 personoj, la konatan libron de Eugene de Zilah, “Vivi sur Barko”, kiun li tradukis el Esperanto en la grekan. Okaze, mi raportis pri la nuna stato de Esperanto per fotoj, filmetoj k.a. Ĉeestis ĵurnalistino en nia ŝtata televido NET, kiu ricevis intervjuon de mi, pri Esperanto, kiel la sola lingva solvo en Eŭropa Unio, por la elsendo “La 27 de Eŭropa Unio”, kiu estos prezentata en Majo aŭ Junio.

3. Mi kreis “Hejmpaĝon” en Ipernity (<http://www.ipernity.com/home/kostas.kiriakos>) kaj komencis riĉigi ĝin per bildoj, albumoj, filmetoj kaj intervjuoj -en televido kaj en radio k.a. Ĝis nun mi afiŝis 805 elmontraĵojn. Mi esperas ke ili, el mia arĥivo kaj el la arĥivo de nia asocio, atingos la nombron de ĉirkaŭ 3.000.

Estas notinde ke, en tiu-ĉi E-agado, staras apud mi kaj helpas min, fervore kaj malavare, Spiros Sarafian.

Kostas Kiriakos

La 12-a NOVJARA RENKONTIĜO

La 12-a NR ĉi-jarfine okazos de la 27-a de decembro 2013 ĝis 3-a de januaro 2014, vendredo ĝis vendredo en Saarbrücken, samtempe kaj samloke kun la 5-a NIS, la programo por junuloj. Ĉi-foje NR denove estos multe pli **proksima al Francio**, ja fakte Saarbrücken estas landlima urbo. Ankaŭ suda Germanio kaj Svislando ĉi-foje pli proksimas. Ni do esperas, ke multaj el vi

eluzos la fakton, ke ekzemple la trajna distanco inter Parizo kaj Saarbrücken estas malpli ol du horoj.

Internacia etoso, prelegoj, kursoj, koncertoj, ekskursoj...

Jen la informa paĝaro kun aliĝilo: <http://www.esperantoland.org/nr/>.

Lu Wunsch-Rolshoven

SOMERA ESPERANTO-STUDADO EN SLOVAKIO

Ĉu vi jam partoprenis SES? SES estas Somera Esperanto-Studado, unu-semajna kurso de Esperanto, kune kun multaj amuzaj ekskursoj kaj eventoj. Ni elkore invitas vin aliĝi jam al la 6-a internacia, amuza Esperanto-semajno - SES 2013. Ĝi okazos en la bela urbo Martin (Slovakio) de la 12-a ĝis la 20-a de julio 2013.



Ju pli frue vi aliĝas, des pli multe vi ŝparas - do ne hezitu.



Ĉiujn detalojn vi trovos ĉe: <http://ses.ikso.net>.

Se vi havas demandojn, ne hezitu kontakti organizantojn ĉe ses@ikso.net aŭ unuope (la kontaktojn vi trovos ĉe: <http://ses.ikso.net/Kontaktoj>)

La SES-teamo

EUROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ EN VROCLAVO, POLLANDO



Kanto estas ĉie. Ĝi akompanas nin hejme, en vendejo, sur strato, en buso... Ni volonte aŭskultas kantojn ne nur kiam ni estas lacaj, malgajaj kaj dezirantaj renovigi niajn fortojn. Kanto helpas nin vidi kaj krei la mondon alimaniere, permesas nin revii kaj transdoni niajn sentojn. Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn instrurezultojn, ĉar dank' al ĝi pligrandiĝas la interesiĝo de la lernantoj pri la prezentataj temoj. Kanto plibonigas la atmosferon de la lernado kaj kaŭzas emocian engaĝiĝon de la lernantoj en la instruprocezon. Dank' al ĝi eĉ nekuraĝaj lernantoj fariĝas pli kuraĝaj. Laboro kun kanto havigas al la lernantoj ĝojon kaj kontenton, tial ni instigu ilin lerni esperantajn kantojn.

Silezia Esperanto-Asocio kune kun Elementa Lernejo n-ro 9 en Vroclavo invitas vin partopreni en la Eŭropa festivalo de Esperantaj kantoj. La Festivalo okazas ĉiujare ĉiun trian vendredon de majo en du kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto.

Partoprenantoj: loĝantoj de Eŭropo.

Aĝo de la ĉeestantoj: de 6 ĝis 18 jaroj.

Ĉiu partoprenanto kantas du kantojn: unu en Esperanto, la alian en sia aŭ fremda nacia lingvo.

Pritaksataj estas nur esperantaj kantoj. Detala regularo troviĝas en la retpaĝaro de Silezia

Esperanto-Asocio <http://esperanto.wroclaw.pl/> aŭ en la retejo de la festivalo

<http://konkurso.europonto.org>

Aliĝu al la ĉi-jara Internacia Festivalo, kiu okazos la 17an de majo 2013 en Vroclavo.

Honora patrono de la festivalo estas Mila van der Horst Kolinska.

Ĉiaj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso: konkurso@europonto.org aŭ malgosia.eo@gmail.com skribante en la temo de la mesaĝo: E-kanto).

Atendas vin valoraj premioj! Unu el ili estos profesia surdiskigo de la premiitaj kantoj. Sendu vian aliĝilon ĝis la fino de aprilo 2013. Nia celo estas disvastigi Esperanton, montri ĝian valoron kaj taŭgecon kaj vigligi la kunlaboron kun neesperantaj medioj.

Małgosia Komarnicka

INTERESAĴOJ PRI LA AGADO DE ESPERANTISTAJ VERDULOJ

Mi volas informi vin, ke la aktuala versio en Esperanto de la Tutmonda Ĉarto de la Verdaj Partioj akceptita en Dakar, 2012, nun troviĝas sur la retejo de Global Greens, kune kun malmultaj aliaj lingvoj.

- *ekzemple mankas la germana -*

<http://www.globalgreens.org/globalcharter>

Labourstart, la internacia sindikata retejo ekzistas ankaŭ en Esperanto, kun tutmondaj raportoj: <http://www.labourstart.org/2013/index.php?langcode=eo>

Manfred Westermayer

UNUA DE MAJO EN HISPANIO



Pedro Hernandez

FEDERICO GOBBO GVIDOS LA KATEDRON EN AMSTERDAMO

La kuratoroj de la katedro Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo rekomendas la italan lingviston Federico Gobbo kiel la novan estron de la katedro. D-ro Gobbo transprenos la taskon de prof. d-ro Wim Jansen, kiu emeritiĝos ĉi-jare kiel speciala profesoro. D-ro Gobbo (1974) estas unu el la plej aktivaj nuntempaj esperantologoj. Li estas i.a. estrarano de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED, la esplora fako de UEA) kaj recenzredaktoro de la revuo "Language Problems kaj Language Planning" (Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado).



La katedro Interlingvistiko kaj Esperanto estis starigita en 1998 laŭ la iniciato de la nederlanda fondaĵo Esperanto en la Instruado, kiu komence ankaŭ respondecis pri ĝia financado. En 1994 ĝi kunfandiĝis kun Internacia Esperanto-Instituto, kiu sekve fariĝis la sponsoro. Ekde la 1-a de septembro 2013 UEA transprenos la respondecon pri la katedro, kiu estas la sola universitata katedro pri sia fako en la mondo.

La katedro havas tri kuratorojn. Du el ili, prof. d-ro A.P. Versloot kaj prof. d-ro P.C. Hengeveld, estas nomumitaj de la universitato. Kiel la kuratoro nomumita de la financa garantiado funkciis ekde la komenco mag. Hans Erasmus, kiu ekde la nova studjaro estos sekvata de mag. Nikola Rašić kiel reprezentanto de UEA. Rašić ankaŭ partoprenis la elektadon de la nova profesoro kiel konsilanto.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 497

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 2-an de majo 2013

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Sean O Riain, Maja Tišljar, Zsafia Korody, Eduardo Kozyra kaj Kazimiro Krzyżak, Estraro de HEJS, Dario Rodriguez, Kostas Kiriakos, Lu Wunsch-Rolshoven, Malgosia Komarnicka, Manfred Westermayer, Pedro Hernandez, Gazetaraj Komunikoj de UEA.

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

